



## La magia rondo de Esperanto-instruado

(Parto 1)

Baldaŭ post kiam aperis la Unua Libro de Doktoro Esperanto, en la metodiko de fremdlingva instruado okazis granda turno. Oni kritikis la metodon tiam uzatan kaj proponis ŝanĝojn surbaze de la tiutempaj esploroj. Sed kial tiu skurĝata metodo meritis tiel severan kritikon?

Por tion klarigi, ni retroiru je kelkaj jarcentoj, al la epoko de **renesanco** (14a ĝis 16a jc.), kies ĉefa intelekta evolutendenco, nomata humanismo, estigis fasciniĝon de la eŭropanoj pri la antikvaj kulturo kaj /klasikaj / lingvoj (latina kaj greka). Sekve, la 18-jarcenta "klerismo" alportis instruadon la modernaj lingvoj kaj enigis ilin al lernejoj. Tio tamen kaŭzis impetan reagon de gramatikistoj, kiuj insultis la nesciencecon de tiu metodo. Rezulte, tiuj alilandaj instruistoj estis forigitaj el la lernejoj, kaj ilian lokon ekokupis klasikaj filologoj. Tiel komenciĝis la nova epoko de konstantaj ŝanĝoj la edukado. Spegulas ĝin la sinsekvaj metodoj en la fremdlingva instruado kaj vi povas konatiĝi kun ili en ĉi tiu artikolo.

### REKTA (aŭ SENPERA) METODO

En tiu metodo oni ĉesu uzi la gepatran lingvon. La elirpunkto estas do ĝuste parolo kaj ne presita teksto. Por aplikado de nova materialo, oni uzu demonstraĵojn teknikojn.



La rekta metodo ege popularis inter la du mondmilitoj, danke al ties legenda pioniro, **Andreo Cseh** kaj liaj disĉiploj, fronte kun Tiberiu Morariu, Lidia Zamenhof (supra foto, meze) kaj kelkdeko de la aliaj.

La kompletaj artikoloj legeblas ĉe:

<https://familiaro.com>

## Novzlando – kie du kulturoj renkontiĝas

En la Rotorua distrikto (norda parto de Nov-Zelando) la terkruco estas nur 4 km dika. Tie oni povas admiri grandan elŝprucadon de la gejseroj, tuj ĉe la urbo – vaporaj pluvkavetoj kun vezikoj fluantaj el la surfaco. La grundo eligas altegan temperaturon, ĝis 120°C.



En tiu loko la anglaj koloniistoj provis konstrui romajn banejojn. Ankoraŭ nuntempe oni uzas la termikan avantaĝon de la regiono, kiu logas turistojn viziti la urbon ĉirkaŭitan per montetoj kaj multa verdaĵo.



Ĉe la samnoma lago troviĝas la Keswick-tendaro, en kiu okazis Fokolara somera urbeto, al kiu venis pli ol 150 personoj el du ĉefaj insuloj de Novzelando. Ili volis pasigi kelkajn tagojn en amika atmosfero, liberaj de la ĉiutaga rutino.

\*

Esther estas maoria virino (indiĝena gento de Novzelando) kaj la gepatroj de Tomaso havas skot-irlandaj radikoj. Ilia vivo ŝajnas kontraŭi la onidiron, ke ne reala komunikado ne povas ekzisti inter kulturoj tre malsamaj. Tomaso venis al Novzelando en sia 26-jaraĝo, uzante la okazon ke la brita kaj novzelandaj registaroj faciligis tiutempe la migradon por junaj homoj. Alveninte al sia nova lando, li eksciis ke tie vivis unue maorioj, la originalaj loĝantoj de tiu insularo.



"Nia internacia felilĉo komenciĝis antaŭ pli ol 40 jaroj kaj plue daŭras, pasinte ŝtormojn – simile kiel multaj aliaj geedzoj."

Esther devenis el tute alia, granda familio kaj havas 12 gefratojn. Ŝi renkontis Tomason dum dancvespero kaj la geduo tuj enamiĝis. Tom rememoras: "Mi ne konsciis, ke ni devenas el tute malsamaj kulturoj. Simple mi estis fascinata per amo". Esther aldonas: "Fakte, mi eĉ ne pensis pri tio, ke Tom estas brita blankulo".

---



## Sisu, peno kiu fortigas (Parto 1)

La vorto “sisu” enhavas la specifan, preskaŭ mistikan sencon, kiu rilatas al finna nacia karaktero kaj verŝajne ne ekzistas unuvorte en aliaj lingvoj. La unikeco de tiu ĉi vorto malebligas rektan tradukon al aliaj lingvoj. Tial, ne povante ĝin esprimi plej koncize, oni uzas por tio aron de ecoj kiel ekz: persisteco, rezistopovo, fortikeco, risortemo /vivenergio aŭ harditeco (malmoleco).





Kiam eksterlandaj ĵurnalistoj volas klarigi la signifon de *sisu*, ili diras: ĝi estas la sola vorto, kiu plej koncize priskribas Finnlandon. Ĝenerale oni rekonas, ke *sisu* precize priskribas la nacian karakteron de finnoj, eble tial la vorto mem estas fiere favorata en Finnlando. Ĉe kelkaj gvidantoj aŭdiĝas la opinio ke, por esti vera finno, vi devas havi *sisu* - t.e. esti homo de forta volo, kuraĝa kaj persista. Kaj tio estas la tiel nomata „finna spirito”.

---

### La finna vojo

Ĉi tiu artikolo konsistas el du subĉapitroj. En la unua, ni daŭrigas fragmentojn de la libro, verkita de prezidento Urho Kekkonen kaj la dua estas dediĉita al Vilho Setälä – eminenta esperantisto, nomita ankaŭ "patro de la E-movado" en Finnlando. Lian nekredeble efikan agadon oni povus dividi inter almenaŭ dek hodiaŭaj aktivuloj.




Malgraŭ sia geografia situo, tuj apud la grandega Sovetunio, Finnlando sukcesis reteni politikan kaj ekonomian suverenecon, kaj restis ekster konfliktoj de la mondpotencoj. La ĉefarkitekto de tiu politiko estis la unua postmilita prezidento Juho Paasikivi. Lia posteulo, Urho Kekkonen decide sekvis tiun linion kaj la finnan neŭtralecon igis eĉ pli aktiva je internacia skalo. Per tiu konsekvenca politiko, Finnlando akiris ekonomian stabilecon, fidon de la superpotencaj ŝtatoj kaj prestiĝon inter plimulto da registaroj kaj popoloj.

\*

Sed la vivon karakterizas ne nur pezaj aferoj kaj seriozaj problemoj. Multaj homoj ŝatas ankaŭ ridi kaj ĝui sian ĉiutagecon kaj eble tial ili partoprenas en diversaj kulturaj aŭ sportaj eventoj. Ni prezentas al vi eĉ la tri tiuspecaj.



Ĉu vi aŭdis pri la sporto nomita "**Edzin-porta vetkurado**" /finne: *eukonkanto*? Ho, jes – tio estas unu el plej originalaj disciplinoj... Aldone informiĝu ke ĉiujare en Finnlando okazas Monda Ĉampionado de Edzinportaj Vetkuroj! Tio ne estas olimpika sporto, do la venkintoj ne ricevas medalojn, sed... kion? Tio vin certe surprizos. Krom tio, vi povas legi ankaŭ pri du aliaj (eble) strangaj kaj ne vaste konataj sportoj.



## Nepalo – konstruado de pontoj

Ni ĉiuj rimarkas, ke – dum eventoj, vojaĝoj aŭ privataj kontaktoj – okazas ofta renkontiĝo kun homoj el diversaj nacioj. Tio ebligas rekte lerni pri aliaj kulturoj, sed ankaŭ donas la ŝancon prezenti nian propran kulturon kaj tradicion. Esperante oni povas kompari tian proceson al konstruado de interkulturaj pontoj.



Tio estis la unika oportuno interŝanĝi valorojn de la malsamaj kulturoj. La gastoj lernis multe pri problemoj kaj ĝojoj de la loka loĝantaro. Estis tre interese observi kiel tiuj homoj vivas en la severa naturo kaj helpas unu la alian solidare. Tio gvidis al pripensoj: kion fari ke ni ĉiuj povu vivi amikece en harmonio kun la naturo kaj kun niaj najbaroj?



La novan tipon de turismo realigas malgrandaj grupoj kiu vojaĝas al malproksimaj teritorioj por konatiĝi kun novaj kulturoj. Tie ili kunloĝas en vilaĝoj kaj lernas pri tradicioj kaj vivstilo de diversaj, ofte indiĝenaj komunumoj.

---

## Kurso por junaj afrikanoj

“Trovu vian pasion, kia ajn ĝi estas. Eniru ĝin kaj faru, ke tio fariĝos parto de via vivo. Tiam vi ekvidos, ke grandaj aferoj okazas al vi kaj pro vi”. Tiuj ĉi vortoj de Allan Armstrong resumas atmosferon de la kurso okazinta en Nairobi (eo: Najrobio), la ĉefurbo de Kenio.



Tiu renoviga kurso titoliĝis *Solidare por la nova Afriko* kaj estis organizita por junaj gvidantoj. Unu el pioniroj de la kurso estis B.M. Nsavyimana, instruisto ĉe Universitato de Orienta Afriko. Li klarigis, ke la kurso celas esplori kaj sperti la ideon de socia gvidado, kiu devus enradikiĝi en valorojn kaj tradiciojn de afrika kontinento.

---

Utilaj plantoj:

## Oksikoko

Oksikoko (*Oxyococcus*) estas ĉiamverda, plurjara planto kun longaj, rampantaj vitoj. La vorto devenas el la greka “**acida**” (oksus – ὄξύς) kaj “**bero**” (kokkos – κόκκος). Plejparto (ĉirkaŭ 95%) de oksikokoj estas prilaborita kaj uzata por fari sukon kaj saŭcon. La resto estas vendata, freŝe aŭ sekigite, al konsumantoj. Oni uzas la fruktojn ankaŭ por kukoj, kompoto, marmelado kaj konfitajoj.



Natura medicino konas tiun trajton, ke bone preparitaj oksikokaj fruktoj purigas la korpon de toksinoj. Certaj kemiaj elementoj de oksikoko aktivigas enkorpe kontraŭ bakterioj kaj fungoj.



Por interligivistikaj hobiuloj estas interesa nomo de ĉi tiu planto, ĉar en diversaj lingvoj ĝi ofte similas al tiu de la granda birdo gruo. Tio facile klarigeblas, ĉar la natura habitato (vivejo) por ambaŭ specioj estas malsekejo. Krome, oksikoko bongustas al gruoj. La detaloj pri tio troviĝas en la kompleta artikolo.

---